



Komencanto

Kiel tio komenciĝis

Rakontas Tereza Kapista,
konata E-mondvojaĝanto kaj
gvidanto de pli ol 120 E-
kursoj tra la tuta mondo

Verkoj de niaj legantoj

Novjara poemeto
Fantazio laŭ vintra temo
Originala eseo pri Kristnasko
en Rusio
Originala fabelo "Vintra
solstico"

Gramatiko serioze kaj ŝerce

Proverboj
por komencantoj
Ŝercaj ilustraĵoj ai
Zamenhofaj proverboj

Humuraj paĝoj

Amuza fragmento "La
netrinkita biero" el la libro de
Tereza Kapista
Ŝercoj kaj anekdotoj pri
Novjaro

La praktiko + impresoj

Rakonto pri "Bona Espero"
en Brazilo

Konkurso "Enigmo 2006"

Korespondu!
Korespondpetoj
kaj anoncoj



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Vintra fabelo

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

novembro-decembro

6 (62)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176. 3015 BJ. Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000. Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenill Road, Carluke, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strĥznice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037. Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8. EE 93812, Kuressaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis. rue de la Crisaie, 75004. Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006. Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro. P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143. Milano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ
Via Leghissa 6. IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto. JP-162-0042; Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000. Kaunas, ab.k. 167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105. ul. Broniewskiego 77-137. PL-01-865 Warszawa
- Portugaliao** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A. 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH 4224 Monteggio

Karaj legantoj!

Tiu ĉi numero fermas jarkolekton "Komencanto-2006". Jes, finiĝis ankoraŭ unu jaro kaj, kiel kutime, fino de jaro estas oportuna preteksto por taksu la faritan dum ĝi kaj pripensi kion ankoraŭ eblas fari en la sekva jaro.

Ni sincere ĝojas, ke dum la jaro 2006 "K" daŭris resti spaco por viaj verkoj, provoj, impresoj. Ni ĝojas, ke en ĉiuj numeroj de la jaro aperis novaj aŭtoroj, ke la malnovaj ankaŭ ne forgesadis kontribui per siaj verkoj, proponoj kaj rimarkoj. Ni estas kontentaj, ke ricevis multe da materialoj, kiuj estis tre interesaj antaŭ ĉio al ni mem – pro tio ni dankas ĉujn! Ni estas kontentaj, vidante ke multaj el la malnovaj aŭtoroj rimarkinde perfektigis kree kaj lingve. Kaj certe ni esperas, ke "K"-2006 estis utila, instrua, interesa, amuza por vi! Kiel ĉiam ni atendas viajn opiniojn pri la jarkolekto de la revuo!

En tiu ĉi, jarfina numero, ni preparis por vi surpaĝan renkontiĝon kaj konatiĝon kun neordinara, interese persono, mirinda esperantistino kaj virino Tereza Kapista. Estas neimageble, sed ŝi, 75-jaraĝa (kion ni mem tute ne supozis, komunikigante kun ŝi somere en Florenco) ne nur daŭrigas mondvojaĝi, sed aktive gvidas Esperanto-kursojn kaj seminariojn en diversaj landoj de la mondo. Pardonu, ke ni menciis ŝian aĝon, sed ni vere opinias, ke ŝi ne devas virine kaŝi ĝin, sed fieri pri ĝi! Nin ravas ne nur ŝia aspekto, entuziasmo kaj energio, sed ankaŭ ŝia humursento. Vi povas mem juĝi tion, legante la fragmenton el ŝia libro sur humuraj paĝoj de la numero.

Ĉi-fojaj verkoj de niaj legantoj estas ligitaj kun iliaj vintraj kaj festaj impresoj. La kontribuoj estas ĉiuj originale verkitaj kaj belaj. Legu kaj ĝuu poemeton de Nikolaj Neĉajev, vintran fantazion de Tatjana Vŝivceva, prikriznaskan eseon de Arina Osipova kaj ĉarman romantikan fabelon de Luiza Carol.

Jean-Luc Tortel el Francio daŭrigas serion "Proverboj por komencantoj" per klaraj kaj spritaj gramatikaj komentoj al ili. Sur la najbara paĝo vi trovos amuzajn ilustraĵojn de Zamenhofaj proverboj per ŝercaj bildoj. La ideo pri tio aperis sub influo de lecionoj de J-L Tortel. La bildojn trovis kaj proponis por publikigado nia samurbanino kaj komencantino Arina Osipova.

Vere interesa materialo kun proponoj pri la ebla kunlaboro atendas vin en rubriko "La praktiko". Ĝin sendis al ni Ksenija Prilepskaja el Brazilo.

La lastan taskon de la konkurso "Enigma-2006" verkis Johana Schertzer-Hervy el Francio. Ni ŝatus scii, ĉu plaĉis al vi la proponitaj enigmoj kaj taskoj kaj ĉu vi mem provis ilin solvi? Rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la januara numero "K"-2007.

Ni ĝojos, se la humuraj paĝoj plibonigos vian humoron kaj se sur la lasta paĝo vi eble trovos por si novan korespondamikon!

Feliĉon, sanon, sukcesojn en 2007!

kore Rafija kaj Viktor Kudrjavec

Komencanto

2006 numero 6 // (62) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavec

kunredaktas Raja Kudrjavecva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2007: internacia tarifo: 18 eŭroj; orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj; aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: ykud-a

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич. 620041.

Vaste konata Esperanto-aktivulino el Beogrado, mondvojaĝantino, kiu travojaĝis pli ol 54 landojn, fervora E-instruistino, kiu gvidis pli ol 120 E-kursojn en diversaj landoj de la mondo, verkistino kaj tradukistino, persono ĉiam juna anime kan preta perfektigi mem kaj perfektigi homojn kaj la mondon.



Karaj legantoj, vi tuj lernu Esperanton kaj ne perdu la tempon kiel mi. Temas pri tio ke mi komencis lerni Esperanton nur kiam mi jam estis fininta miajn laborjarojn, entute 37 jarojn mi laboregis, ne povante ien ajn veturadi kaj ripozis nur dum ferio, kiu ne estis tro longa. Kiam mi jam ĝuis la unuan monaton de la pensia tempo, venis Tibor Sekelj mia amiko, fama esperantistomondvojaĝanto, kaj diris al mi: "Do, nun vi estas riĉulino, havas tempon superfluan, okupiĝu pri Esperanto".

Eble mi ne prenis de li tiun konsilon, se li ne estus ankaŭ diranta, ke la venonta kongreso okazos en Ĉinio, sed nur tiuj rajtas ĉeesti, kiuj konas la lingvon. Mi ĉiam miris pri Ĉinio, grandega lando kun plej multaj loĝantoj en la mondo. Sed mi iomete dubis, ke mi povus ellerni la lingvon ĝis la kongreso. Tibor konatigis min kun es-

perantisto kiu gastante ĉe sia frato en Svedujo, ellernis la Ĉehmetodon(*). Tiu homo Ljubo Grabarevic, alvenadis al mia domo ĉiutage kaj instruis min. La instruado estis tre interesa. Li mem eltranĉis el iuj lignetoj ĉevalon, hundon, katon, kiuj estis bedaŭrinde ege primivite ellaboritaj. Mi ne sciis ĉu mi ridu, aŭ ripetu la vorton, kiam li montris al mi la objektojn. Tamen mi estimis lian klopodon instrui min sen tradukado. Kaj lia metodo montriĝis sukcesa, ĉar post 2 monata lernado kun li, mi iris al Internacia seminario en urbo Eger en Hungarion. Tie ili demandis min ĉu mi estas komencanto aŭ mi ŝatus la daŭrigan kurson. Senpripense mi diris: la daŭrigan. Sed kiam mi troviĝis inter jam bone parolantaj seminarianoj mi vidis, ke mi ne sufiĉe scias la lingvon. Pro tio mi ĉiun vorton de la instruisto skribis, posttagmeze diligente uzante la vortaron serĉis la nekonatajn vortojn kaj tradukis la frazojn. Finfine mi sukcesis fari la ekzamenon. En la ĉambro mi loĝis kun germanino kaj rusino, sed mi tute ne deziris al ili diri, ke mi lernis kaj la germanan kaj la rusan lingvojn, ĉar ili estis komencantoj kaj mi sciis, ke tiam ili ne klopodos uzi Esperanton. Ni estis pli ol 100 el 15 landoj. La instruistoj estis el 4 landoj. Kion diri? Al UK en Pekino mi estis la organizanto de la grupo el Jugoslavio kaj pli ol 40 homoj devis pere de mi enpigi la vojaĝon. Ankaŭ mem Tibor, li estis surprizita, ke mi fariĝis tiom aktiva. Ni kune flugis al Pekino. Tio estis mia venko, tiel mi tion taksis

Ne perdu la tempon!

tiam. Mi miris Ĉinion, ĝi ŝajnis al mi mirakla, eble pro la peno kion mi faris por vidi ĝin! Neniom mi bedaŭris, ke mi lernis kaj lernis, ripetis kaj ripetis! Post tio mi vidis anoncon, ke okazos Vegetarana Renkontiĝo en Slovakio. Mi iris tien tute ne estante vegetarano, sed mi deziris ie aktive uzi la lingvon. Tio sukcesis, ĉar tien venis homoj el deko la landoj kaj tie ni nur kunvivis kaj lernadis pri natura manĝado, pri lingvo ni ne estis instruitaj, ĉar ĉiuj jam estis veraj esperantistoj. Sed la novaj vortoj abundis, ĉar pri la vegetaloj kaj manĝaĝo-nomoj mi ne tro sciis. Do, mi ellernis tiam kio estas urtiko, hordeo, fungo, fromaĝo, ajlo, salo, ktp. Ni manĝis kaj kuiris, parolante en Esperanto. Ni multe ekskursis, banis sin, promenadis, kelkaj sportis kaj ĉiu tiu aktivado bezonis novajn vortojn. Ni estis ĉe banejo kiun uzis jam la romianoj do, de nove vortoj el historio: fortikaĵo, ruinaĵo, regno, jarcento, ktp. Mi taksas, ke tiu renkontiĝo estis bonega liguopraktiko, dum 2 semajnoj mi ne parolis alian lingvon krom Esperanto.

Kiam mi demandis Tibor: "Kiam mi jam bone konos la liguon?", li ridante respondis: "Kiam vi jam komencos sonĝi en Esperanto". Kaj post nur 5 jaroj, tio okazis, kiam mi estis dum 3 monatoj en Brazilo kaj instruis en multaj urboj, loĝante ĉe privataj domoj de esperantistoj. Tiam mi vere sonĝis, eĉ strange, ke sonĝe mi estis hejme, kaj en mia hejmo ĉiuj parolis Esperanton.

Mia Esperanto-mondo larĝe malfermis al mi sian pordegon. Mi travojaĝis 54 landojn, inter aliaj: Brazilo, Aŭstralio, Kubo, Nov-Zelando, Irano, Germanio, Nederlando, Meksiko, Burundo en Afriko, ktp. kaj preskaŭ ĉie mi instruis, gvidis kursojn aŭ seminariojn. Kiam mi ne vojaĝis, mi tradukis, aŭ verkis pri miaj travivaĵoj en tiu bela Esperantujo. Nun mi vidas, ke la periodo ĝis kiam mi ne konis Esperanton estas perdita, senutila, ĉar mi vere vivis kaj ĝuis la vivon nur post mia esprantistiĝo. Mi ekhavis multegajn geamikojn, ĉeestis multajn kongresojn, renkontiĝojn, seminariojn, estis aktiva en societoj, ne ŝparante mian forton, sed tutkore dediĉante tutan mian tempon al Esperanto. Mi gvidis pli ol 120 kursojn! Pro tio mi diras: ne atendu, eku tuj al lernado, ne perdu la jarojn!

Sed vi devas scii, ke per Esperanto oni povas fari multon. Nur vi mem devas trovi tion, kio estas por vi interesa kaj konvena kaj engaĝu vin en tiun sferon. Ekzemple pere de E-to mi eksciis pri *Taiĉi Ĉuan* (korpekzerco ĉina) kaj nun mia filino havas grupon kaj jam akiris kelkajn medalojn, arĝentajn kaj bronzajn, en monda konkuro de tiuj ekzercoj. La alia filino ellernis la Japanan masaĝon ankau dank' al Esperanto. Kaj mi ellernis tion, ke ĉie en la mondo la ĝojo ridigas la homojn kaj la doloro elvokas larmojn. Ĉiuj ni estas homoj kun koro kaj ruĝa sango, sendepende de la haŭt-koloro. Mi ellernis ankaŭ tion, ke la plej granda valoro estas la PACO ĉie en la mondo.

Tereza Kapista

Karaj legantoj! Tereza Kapista en 2005 jaro la duan fojon estis invitita labori cele de la realigado de projekto "Lingvo de Paco", en kies kadro estis organizita Internacia Seminario en Burundio (Afriko).

La seminarion organizis UEA kaj la Fondajo Hans el Amsterdamo. La studseminario estis agnoskita de Unesko kiel unu el la projektoj, farataj de la jardeko 2000-2010 por Kulturo de Paco de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj.

Pri sia vojaĝo al Afriko kaj pri sia laboro por tiu ĉi seminario Tereza verkis interesegan libron kun multaj koloraj fotoj. La libro nomiĝas "Esperanto Lingvo de Paco". Ĉi-tie ni prezentas ul vi kelkajn fragmentojn el ĝi.

La internacia seminario en Buĵumburo

Post unujara prokrasto fin-fine mi sukcesis forvojaĝi al Burundio la 29-an de julio. La vojaĝo estis longa kun malbonaj kunligoj, sed tamen mi atingis la celitan lokon, la ĉefurbon Buĵumburon. Tie bonvenigis min 5-6 esperantistoj... Ni tuj per taksio vojaĝis la lokon, kie okazos la Internacia seminario. Jam dum la unua vojaĝo mi spertis ke la taksio estis superŝarĝita kaj ke neniu kontrolas kiom da homoj sidas en ĝi (apud la ŝoforo 2 homoj, malantaŭe eĉ 5, ĉar la afrikanoj estas maldikaj). Eĉ se iu kontrolos, la ŝoforo donus al la kontrolisto iom da mono kaj daŭrigos la vojon...

La seminariejo estas grandega lernejo. Nomiĝas Ngagara lernejo. En unu ĉambro estas 4 vicoj da benkoj. En unu vico estas eĉ 17 benkoj. Mi rapide kalkulis, estas loko por ĉirkaŭ 150 lernantoj... La benkoj estas el lignoj, tro simplaj. Verdire tiaspecajn lignajn, malbone faritajn benkojn mi vidis nur en nia Pedagogia muzeo en Beogrado, kie estas eksponaĵo kiel rarajo el frua periodo, komence de la funkciado de la unuaj lernejoj...

Jam la duan tagon post mia alveno mi komencis instrui. Kun tremanta koro mi aliris la lernejon, ne sciante, kio atendas min tie, sed feliĉiga evento: la lernoĉambro estis plena! Venis 12 kongolandanoj, 4 el Tanzanio, la resto el Buĵumburo kaj el urbo Rumonge el Burundio. Entute mi havis 88 seminarianojn tie, en Buĵumburo. Mi estis kontentega, ĉar la plejparto de ili estis junaj kaj studentoj. Tio ege gravas al nia movado, - havi posteulojn, kiuj povos pluen porti la torĉon.

La nivelo de ilia scio estis tre diversa, do mi iomete flanken metis la komencantojn, ilin instruos la instrukapablaj post mia reiro, kaj mi pli laboris kun aliaj...

Nur en kelkaj unuaj minutoj mi sentis, ke la seminarianoj esploras, kia mi estas, kion mi faros kaj postulos de ili. Sed jam en la fino de la unua studhorro ĉio estis klara. Mi klarigis, ke neniu devigis min veni kaj mi ĉion faras volontule kun amo al ili kaj granda komprenemo. Do, la rilatoj estis bonaj, kaj se iu havis problemon, li petis pardonon pro la foresto dum 1-2 horoj. Sed tio malofte okazis.

Mi ne nur instruis, sed multon parolis al ili pri UEA, TEJO, ILEI, S.A.T., Zamenhof, diversaj E-Asocioj ktp. Tiam mi eksciis, ke ili neniam povus havi ekz., fervojistan asocion, kiuj estas tre aktivaj en Eŭropo, ĉar en ĉi lando ne ekzistas fervojo. Ni diskutis pri diversaj organizaj kaj financaj solvoj de ilia problemo. Ili ĉiuj atendas monon el Eŭropo. Mi diris, ke ĉiu klubo mem devas ellabori programon, pere de kiu ili povos prilabori aŭ havigi al si monon por povi kopii librojn, aŭ aĉeti iun alian lernomaterialon. La sendado multekostas kaj eĉ se iu decidus donaci, iu alia devas financi la sendokoston...

La plej entuziasmaj estis la kandidatoj por instruistoj. Ili vere venadis regule kaj klopodis ĉion vidi kaj aŭdi. Mi devigis ilin veni al la grupo kaj de la komencantoj, kaj de la progresantoj, tio signifis, ke ili estis dum la tuta tago tie, kaj vere tio utilis al ili, la plejmulto el ili eĉ loĝis tie, ne estis problemo ĉeesti.

Mi jam de la komencaj horoj foje petis iun, ke li klarigu kelkajn sufiksojn aŭ prefiksojn, ĉar tiamaniere mi vidis jam de la komenco, kion kaj kiom li ĝuste sciis...

Dum seminario estis organizita manĝado, tiamaniere ke venis kuiristinoj kiuj metante grandegan poton sur tri ŝtonojn, faris fajron kaj kuiris, subtegmento de la apuda domo ekstere. La seminarianoj ricevis nur tagmanĝon kaj vespermanĝon. La manĝaĵo preskaŭ ĉiam estis la sama: fazeoloj nepre ĉiutage, kaj kaĉo el manioka faruno.

Foj-foje rizo, sed tio jam estas lukso. Oni panon ne manĝas. Ĝi ekzistas, sed multekostas kaj ĝin manĝas eble nur la pli riĉaj. La seminarianoj ne ricevadis panon. En Burundio oni ne semas tritikon, mi ne eksciis kial...

La manĝado okazis en la apuda ĉambro. Sur tabloj estis metita po unu granda ujo kun akvo kaj ĉiuj aliris lavi la manojn sen sapo, iomete trempis la fingrojn, sen viŝado. Poste estis alportita alia

ujo kun kaĉo de manioko kaj nur en unu telero iom da fazeoloj. Ĉiuj manĝis sen manĝilaro kaj teleroj, starante.

Per la fingroj oni prenadis unue la kaĉon, formante el ĝi buletojn kiujn oni trempas en fazeoloj, prenante iom da fazeoloj. Dum la manĝado ili trinkas iom da akvo. Kelkfoje estis kuirita rizo kaj tiam la seminarianoj estis pli kontentaj. Unu foje mi aĉetis al ili 2 kg da vivando kaj kafo, kaj oni memorigis min, ke mi devas aĉeti ankaŭ sukeron por la kafo. Ili ŝatas trinki kafon, sed ne povas aĉetadi ĝin. Do, ni iomete festenis...

Dum la tuta tempo mi sentis, ke ili estas ege dankemaj pro mia vizito, ĉar nun okazas la unuan fojon, ke ili vidas vivan Esperante parolantan eŭropaninon.

Dum la seminario mi estis akceptita ĉe la ministerio de Kulturo... Ili promesis al ni, subteni la iniciativon, ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj, kiuj petos permeson instrui ĝin. Akceptis nin ankaŭ la direktoro de radiostacio-elsendejo.

Estis sendita ĵurnalisto al ambaŭ lokoj de la seminariejo, kiu faris 90-minutan programon, kiuj oni elsendis en du partoj. La unuan fojon estis publikita informo per radio pri Esperanto. Ili ankaŭ ilustris la elsendon per niaj kantoj...

Mi instruis ankaŭ sabate, nur dimanĉo estis dediĉita al ekskurso,



sed bedaŭrinde ne ĉiuj povis iri al la lago Tanganjika, ĉar oni devis pagi vojaĝkoston ĝis tien. La urbo estas ĉe la lago, sed tien ne iras buslinio, oni devas lui taksion. Tamen dekoj da ni estis ĉe la lago. Kvankam estis varmego, mi bone eltenis la klimaton, trinkante senĉese akvon...

La 12-an de aŭgusto ni finis per la lecionoj de Tibor Sekelj "Vojaĝo tra la mondo" kiun la seminarianoj tre ŝatis. Sed multajn aferojn ili ne konis. Mi tre ofte devis klarigi, kio estas ekzemple placo, parko, bulvardo, kiel aspektas multetaĝa domo, leviloj-liftoj, kio estas tramo, trolebuso, subtera trajno. Vagonon, kupeon mi desegnis, ĉar mi ne havis bildon pri trajno, mi ne alportis, ĉar mi eĉ ne supozis ke en tiu lando ne ekzistas trajnoreloj kaj trajnoveturado. Kiam ili komprenis, kia estas la vagono, ili tute ne povis

kompreni kial estas dividata la vagono je kupeoj, kial ili faris multajn pordojn en unu vagono, kial oni dividis la vojaĝantojn ĉu ili ne povas esti kune? Kiu metis la ferajn relojn sur la teron, por ke la trajno povu iri? Kial la lokomotivo tiras la vagonojn? Ne miru pro tiaj demandoj, ĉar el 163 seminarianoj en ambaŭ urboj, nur 3 havis televidilojn, kaj ili povas rigardi nur 3 hejmajn kanalojn.

La 18-an de aŭgusto estis la lasta tago de nia seminario.

Finfine 18 seminarianoj estis faritaj la ekzamenon por instru-

kapablo, kio ege ĝojigis min. Ili ne estas ĉiuj perfektaj, sed ĉiuj promesis plu lerni kaj perfektigi. Mi akcentis, ke ili ĉiam devas lerni plu, kaj same tion faras ankaŭ mi, ĉar la lingvo estas viva kaj ĉiam estas esprimoj, kiuj estas novaj, nekonataj kaj pli belaj ol tiuj, kiujn ni jam ellernis. Dankante al la kursanoj ilian diligentecon, mi ludis al ili teatraĵeton, vestita en afrik-stila vestaĵo. Kiam mi eniris la lernoĉamb-

ron ili surprize rigardis min kaj ĝoje salutis, plaĉis al ili mia emo aspekti kiel afrikanino. Ili ĝuis la prezentadon kaj ridegis, ĉar estis komedieto. Dankis min per aplaŭdo... La 8-an de septembro kun Japhet, Birindwa, Jeremie kaj Hassumani per taksio ni vojaĝis al la flughaveno. Mi ĉirkaŭbrakis ilin sincere kaj kun espero, ke ni renkontiĝos ie en Eŭropo, aŭ mi ekhavos forton denove viziti ilin. Do, mi diris "ĝis revido" kaj ne "adiaŭ".

Mi ekis al dogano kaj pro la larmoj en okuloj deformiĝis la marmoraj pavimoj surplanke de la flughaveno. Mia gorgo spasmis, tamen mi sentis iuspecan kontenton. Mi ne bedaŭris, ke mi decidis veni ĉi tien. La fruktoj de mia laboro poste ekkreskos. Mi certas.

Neĉajev Nikolaj [Irkutsk, Rusio]

Novjaro

Decembro krudas, nordas,
Orelon mian mordas.
Pro frosto mi ne ploras,
Malvarmon mi ignoras.
Min ravas vintra belo,
Mi vivas en fabelo:
Tapiŝas neĝa molo,
Purpuras la pirolo,
Stelaroj altaj helas,
Abio festa belas,
Novjaro ĝojon donas,
Estonto nepre bonos!



La vintra promenado

Sadretdinova Naila [Voronej, Rusio]

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Novjaraj kontribuoj

Mola neĝo, briletanta en la lunradioj, mute kaj majeste kovris la tutan surteran spacon. Ĝi apenaŭ knaris sub la piedoj de solulo, marŝanta laŭ la blanka tapiŝo. La humoro de la marŝanto estis same majesta kaj paca. Malnova peza ŝafpelto kaj grandaj feltbotoj tute ne malhelpis al li paŝi leĝere kaj rapide. Sur la vasta ebena kampo, virge blanka, ĉene postsekvis lin ovalaj feltbotaj spuroj. Malantaŭ la marŝanto preskaŭ ne videble lumis jam tre-tre malproksima la Urbo, kies bruo ne plu incitis, ne plu logis la laciĝintan pro ĝi viron.

Li ĝisiris la randon de la ebena kaj profundigis en malhelan pinan arbaron. En la arbaro neĝo estis ŝajne pli profunda, ol sur la ebena, la viro marŝis jam malpli rapide. Li subite sentis sur la ŝultroj premon de la dorsosako. Lia dorsosako estis same malnova, kiel la pelto kaj la botoj. Li zorgeme ordigis la sakon sur la dorso kaj rapidigis la paŝojn. Pli kaj pli fortiĝanta frosto tute ne malvarmigis la viron. Paŝo post paŝo arboj iĝis pli grandaj, neĝo pli profunda, luna lumo pene traboris la densegan arbaron, tamen la viro ŝajne bezonis neniun lumon. Li fikse rigardis la spurojn, birdajn kaj bestajn, sur la lanuga neĝa tapiŝo. La nokta arbaro silentis. Neniu brueto atingis la orelojn de la marŝanto. Proksimiĝinte al granda maljuna pino, la viro haltis kaj ĉirkaŭrigardis. Kvazaŭ el-sub la neĝo antaŭ li aperis tri grandaj fortaj lupoj.

La plej maljuna morne demandis:

– Ĉu alportis?

– Certe, - diris la viro.

Li forprenis la sakon de la dorso, malligis ĝin kaj eligis kapacitan platan sakegon plen-plenan de bovaj ostoj. La lupoj flaris la ostojn kaj grimacis malkontente.

– Ĉu vi aĉetis tion en vendejo?

La viro kapjesis. La lupoj ankoraŭfoje grimacis kaj ekvoris la ostojn. Dume ili voris, la viro elfosis el-sub neĝo larĝan lignan sledon.

Jungitaj lupoj fulmrapide tiris la sledon laŭ la malluma arbaro. La viro kun ĝuo lokiĝis en la sledo kaj kontente ridetis. Glacia vento blovis en la maljunan vizaĝon, hirtis longan grizan barbon, apenaŭ aŭdeble knaris neĝo sub la sledo, klakis io, malbone fiksita kaj brue spiris la kurantaj lupoj.

Post kelkaj minutoj de freneza veturado la sledo haltis ĉe negranda ligna dometo. Blindete lumis prujne kovritaj fenestroj, el la kamentubo pigre rampadis grizblanka fumo. La viron renkontis bela junulino, ĝoje kisis lian barbozan vangon kaj demandis scivoleme:

– Ĉu vi sukcese vojaĝis, La Avo?

– Pli ol, - karese respondis La Avo.

El la dorsosako li zorgeme prenis donacon – lanugajn blublankajn ĉapeleton, gantojn kaj koltukon.

Ili eniris la domon kaj ĝis la aŭroro, trinketante aroman varman herbeon, li akurate enskribadis novajn novjarajn poemetojn kaj kantojn, kiujn li aŭdis de infanoj dum ĉi-jara novjara festo, en grandan malnovan kajeron, kiu nomiĝis “Kontribuoj al Avo Frosto”.

Arina Osipova lernas Esperanton dum unu jaro. Ŝi jam provas verki en la internacia lingvo. Ĉi tiu eseo estas ŝia debuto en "Komencanto".

Osipova Arina [Jekaterinburg, Rusio]

Malgranda somero inter malvarma vintro

Strange, kial multaj homoj ne ŝatas vintron? Ĝi havas tiom da avantaĝoj, ke simple estas maleble ne atendi ĝian alvenon. Nu, oni pensas, ke estas malvarme, vin pinĉas frosto, kruela vento kun pikanta neĝo batas en la vizaĝon kaj matene iĝas malfacile vekigi en varma lito por iri al laborejo... Sed kiel estas mirinde bele ĉirkaŭ: neĝo kovras la tutan teron per blanka lanuga kovrilo; arboj, kiel la homoj, vestas neĝajn peltojn... La riveroj kovriĝas per brila glacio, sur kiu oni povas vidi ne nur sian respegulon, tegitan per prujno, sed ankaŭ la radiojn de vintra vivĝoja suno.

Kaj kiel eblas ne atendi vintron, se nur dum ĉi tiu sezono oni povas kun avida apetito manĝi mandarenojn,odoro de kiuj aludas, ke ie apude jam vagas Novjaro kaj post ĝi sekvos Kristnasko – la plej bonegaj festoj por infanoj kaj plenaĝuloj. Nur dum ĉi tiu fabela tempo ĉiu el ni povas senti sin denove infano, ĉar nenio alia portas tiom da ĝojo kaj admiro, kiel tumulto de la vintraj festoj, kaj kaŝado de donacoj ĉe neordinare bele festonita novjara abio!!!

En Rusio ĝis la Oktobra revolucio oni festis Kristnaskon antaŭ Novjarfesto, la 25an de decembro. Nun ĉi tiun kristanan feston oni festas post la Novjaro – la 7an de januaro.

Sed rusia popolo ne forgesas ankaŭ la malnovajn tradiciojn, tial solenado komenciĝas ekde la "malnova" Kristnasko kaj finiĝas per "malnova"(*) Novjaro. Tial kristnaskaj-novjaraj festenoj daŭras dum tri semajnoj.

En hodiaŭa Rusio Novjaro kaj Kristnasko iĝas sekularaj festoj, kelkaj malnovaj moroj malaperas. Tio, certe, iomete malgajigas, sed samtempe ĉiu generacio penas amendi en Kristnaskon ion novan, provas iel modernigi la feston. Tio tute ne signifas, ke malnovaj tradicioj plene forgesiĝas, simple multaj el ili perdas sian aktualecon. Antaŭe, ekzemple, ekzistis aŭguro, ke, stelplena novjar-

nokta ĉielo atestas pri estonta abunda rikolto de pizo. Prujno sur la arboj signifis la bonan rikolton de pano. Virinoj bobenis dum la Kristnasko rigidajn bobenojn de ŝpinaĵo por estontsomere kresku grandega brasiko... Hodiaŭ jam estas naive kredi je similaj aŭguroj, ĉar al ni ne danĝeras malsato kaj ni povas senprobleme aĉeti ĉion necesan en vendejoj.

Sed hodiaŭ multe da junulinoj (ŝatantinoj de ĉiaspecaj aŭguradoj) havas siajn tradiciojn dum la Novjaro. La plej populara estas "forbruligo de ŝatata revo". Dum la Kremla tur-horloĝo batadas 12-foje, junulinoj skribas sian deziron sur antaŭpreparita papereto (ju pli malgrande, des pli bone), forbruligas ĝin, jetas la cindron en pokalon kun ĉampano kaj eltrinkas tiun ĉampanon. Oni diras, ke se vi sukcesos fortrinki ĝin ĝis la 12a bato, la deziro nepre plenumiĝos dum la venonta jaro.

Sed por ĉiam, ŝajne, restos la nepra kutimo festi Novjarfeston memorante la principon: kiel vi renkontos la novan jaron, tiel vi pasigos ĝin. Se gaje kaj ĉe la abunda tablo, - do, la venonta jaro ankaŭ estos por vi gaja kaj abunda je bongustaĵoj.

Reale estas malfacile imagi tiun rusan homon, kiu dum novjara nokto, post batado de la Kremla tur-horloĝo, ne elirus surstraten por beligi la noktan ĉielon per piroteknikaĵoj, por gliti de sur la glacimonteto suben inter la amaso de similaj dezirantoj gliti; por rondodanci ĉirkaŭ la urba novjara arbo; por simple krei finfine kaj gratuli ĉiun renkontiton.

Por rusianoj Novjarfesto estas senzorga tempo, kiam dum la tuta nokto neniu sentas malfortiĝon kaj dormemon kaj povas gaje renkonti aŭroron de la unua januara tago.

Jes, Novjarfesto estas senzorga tempo, kiam ĉiu povas amuziĝi kiel infano kaj ludi neĝbulojn tiel entuziasme, ke neĝo trafas sub vestojn kaj en ŝuojjn... Kaj tiel varme kaj gaje iĝas pro tia senzorga amuziĝo, kvazaŭ vi trafas en varmegan someron kaj plene degelas la vintra frosto, kiun vi jam tute ne sentas.

Kaj ĉefe, ĉiu el ni atendas kun la animtremo la Novjaron, ĉar ĉiu kredas profundanime, ke nepre okazos miraklo, kuin oni atendis la tutan jaron, povas esti dum kelkaj jaroj, sed aliaj eĉ la tutan vivon. Ĉu eble ankaŭ mem la Novjaro estas miraklo?



Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]

(*) "malnova" Novjaro – Novjaro laŭ la antaŭrevolucia kalendaro, oni festas ĝin la 13-an de januaro

Karaj legantoj! Aŭtorinon de tiu ĉi materialo vi jam konas laŭ publikajo en "K" №4-2006. Ĉi-foje legu kaj ĝuu belegan vintran fabelon, kiun ŝi verkis sub influo de la impresoj post vizito de la horloĝmuzeo en Svisujo.

Luiza Carol [Kiriati-Yam] . Israelo]

La vintra solstico

Ie, en la montaro, en la mezo de larika arbaro, troviĝas kastelo de horloĝisto. Ene de la kastelo, estas kolektitaj plej karaj diversspecaj kaj diversgrandaj artaj horloĝaĵoj: brakhorloĝoj, murhorloĝoj, tabulhorloĝoj, poŝhorloĝoj, ktp. Plej multaj el ili estas pentritaj, aŭ skulptitaj, aŭ akompanataj de mekanikaj pupoj aŭ orgenoj. Iuj diras, ke la horloĝisto, kiu kreas tiujn horloĝaĵojn, estas pli ol naŭcent jaraĝa; iuj diras, ke li restas por ĉiam dudekkvin-jaraĝa, ĉar li sukcesis haltigi la tempon de sia vivo; aliaj diras, ke la horloĝisto estas malvidebla por homaj okuloj, do oni ne povas scii ĉu li aspektas juna aŭ maljuna; aliaj diras, ke la horloĝisto estas nur granda mekanika pupo laŭ la formo de maljunulo, delonge farita de mistera sorĉista horloĝisto, kiu pridonacis sian pupon per la kapablo krei aliajn pupojn, horloĝojn kaj orgenojn.


Ĉiukaze, la kastelo estas nun horloĝmuzeo, do multaj homoj vizitas ĝin, ĝuante ĝiajn artajn aĵojn, kaj poste bablante pri misteraj historioj rilatantaj al tiu kastelo.

Oni diras ke ĉiujare, dum la plej longa nokto de la vintro, la kastelon vizitas alilanda sorĉisto, venanta de tre malproksime per blua elefanto. En tiaj okazoj, la mistera horloĝisto tre gasteme akceptas lin. En tiaj okazoj, ĉiuj lampoj de la kastelo ekŝaltiĝas, dum ĉiuj horloĝoj, pupoj kaj orgenoj estas funkciigataj laŭvice, por ke la estimata gasto ĝuu la plej grandan spektaklon. Oni invitas ankaŭ la ĝemelajn feinojn de la arbaro, Dorna la malbenanta kaj Lilaka la benanta, kiuj per magio

vivigas la pupojn.


Senaĝaj estas la du feinoj, kvankvam Dorna kutime montras sin kvazaŭ ĝiban maljunulinon, apogantan sin per bastono kaj kovrantan sin per kapuĉmantelo, dum Lilaka kutime montras sin kvazaŭ graciezan junulinon, dancantan kaj ornamantan sian kapon per florkrono. Proksime de la noktomezo, laŭ sia plaĉo, la sorĉisto elektas vojaĝontan pupon. La du feinoj kune pridonacas tiun pupon per sekretaj malbeno kaj beno. Noktomeze, la lampoj malŝaltiĝas. En profunda mallumo, oni aŭdigas ĉiujn murhorloĝojn batantajn: unu... du... tri... kvar... kvin... ses... sep... ok... naŭ... dek... dek unu... dek du!! La lampoj reŝaltiĝas. La vojaĝinta pupo revenas en la kastelon post vojaĝo de cent dudek jaroj tra la mondo! Poste, iom post iom la kastelo mallumiĝas, la sorĉisto foriras per sia elefanto, la ĝemelaj feinoj malaperas... Kvieto ĉirkaŭvolvas la kastelon ĉirkaŭtante de malluma densa arbaro, kaj oni povas aŭdi nur la horloĝajn korojn batantajn: tik-tok, tik-tok...

Foje, la pupo, kiun la sorĉisto elektis, estis soleca flutisto, staranta apud la pordo, bonveniganta kaj adiaŭanta la vizitantojn. La ĝemelaj feinoj flustris malkompreneblajn vortojn, kaj blovetis sur lian fluton. Jen la lampoj malŝaltiĝis, la murhorloĝoj ekbatis: unu... du...



pentris sur la paĝoj Nadejda Voroncova [Kurgan, Rusio]

Pol troviĝis sola en malluma vintra nokto, en malluma densa arbaro de larikoj. Kvazaŭ ebria, kvazaŭ vekita el longega dormo, li rigardis la grandajn neĝkovritajn larikojn, apenaŭ lumigitajn per steloj. "Kie mi troviĝas?" li demandis sin, provante rememori ion ajn. Subite, li rememoris pri sia fluto. Li serĉis ĝin kaj trovis ĝin ligita je sia zono. Kaj li komencis ludi ĝin. Ekmateniĝis, kaj la neĝvolvitaj larikoj ekbrilis mirinde en la sunleviĝo. Scivolemaj sciuroj kaj leporoj preterpaŝis la flutiston, kaj gajaj paseroj akompanis lin per siaj voĉoj. Pol ludis, ludis, kaj iom post iom en lian menson eniris lumo. Li vidis en la ĉielo la sunon suprenirantan kaj la lunon malsuprenirantan, kvazaŭ ili estis du dentitaj radoj de grandega horloĝo. Ludante la fluton, li paŝis tra montaroj, tra vilaĝoj, tra urboj, ĉie renkontante homojn kaj bestojn.




Li iom post iom kutimiĝis pri tiu mondo, kvazaŭ li jam vizitus ĝin foje kaj nun li rememoris pri ĝi. La sezonoj pasis, la jaroj pasis, la jardekoj pasis, sed Pol ne maljuniĝis kaj ne laciĝis ludi, kvazaŭ li ĵus prenis sian fluton al sia buŝo tie, en la arbaro de neĝkovritaj larikoj. Komence, la mondo ŝajnis al li belega, bonega kaj gaja. Sed ju pli li promenis tra la mondo, des pli malgaja ĝi ŝajnis al li. Li vidis homojn kaj bestojn suferantajn pro malsano kaj pro malamo; li vidis homojn kaj bestojn malsatantajn kaj soifantajn; li vidis vivajn estaĵojn mortigantajn aliajn vivajn estaĵojn; li vidis homojn detruantajn la arbarojn, malpurigantajn la riverojn kaj la marojn, kaj eĉ malpurigantajn sian propran aeron. Pol vidis ĉion tion, kaj malĝojigiĝis. Li ripozis iom, sidante sur benko, en parko de urbeto. Li ne bezonis manĝi aŭ trinki, li ne bezonis dormi, ĉar lia koro batis laŭ malrapidega ritmo de alia mondo, kiun li tute forgesis.

Estis printempo, sed li sentis nek varmon, nek malvarmon, daŭre portante la vestojn en kiuj li vekigiĝis antaŭlonge, en la larika arbaro. Tamen, nekomprenbla doloriga soleco kaptis lian animon.

Estis printempo, sed li sentis nek varmon, nek malvarmon, daŭre portante la vestojn en kiuj li vekigiĝis antaŭlonge, en la larika arbaro. Tamen, nekomprenbla doloriga soleco kaptis lian animon.

"Kial mi troviĝas ĉi tie?" li demandis sin. Lia mano prenis la fluton, kaj li rekomencis ludi ĝin. Jen ridetanta junulino eniras la parkon kaj proksimiĝas al lia benko. Ŝi moviĝas laŭ la ritmo de lia muziko. Ŝi ŝajnas spiri laŭ la ritmo de lia muziko. Ne, ne, tio ne veras. Li ŝajnas fluti laŭ la ritmo de ŝia spiro. Ne, ne, tio ne veras. Ili ambaŭ ŝajnas spiri laŭ la ritmo de la stelmoviĝo. Ĉar jes, ekvesperiĝis... Aŭ eble ekmateniĝis... Aŭ eble tute sentempigiĝis... La fluto malaperis, sed la aero subite ekmuzikiĝis... Lia sango vibris...

Mod estis la nomo de la junulino, kaj Pol baldaŭ edziĝis kun ŝi. Li iĝis tute normala junulo, krom tio ke li nenion rememoris pri sia deveno, kaj tute ne sciis kiom li aĝis. Mod kaj li aspektis samaĝaj kaj ĉielkonvenaj unu al la alia, do neniu miris pri ilia geedziĝo. Ilia kunvivo estis kelkfoje feliĉa, kelkfoje malfeliĉa, kelkfoje kaj feliĉa



kaj malfeliĉa, plej ofte nek feliĉa nek malfeliĉa... samkiel okazas kutime en la mondo. Benitaj kaj malbenitaj estis iliaj vivoj, samkiel okazas plej ofte. Mod estis instruistino en elementa lernejo, kaj Pol fariĝis instruisto pri muziko. Li anstataŭigis la perditan fluton per nova ligna fluto, per kiu li ludis kelkfoje en koncertoj.

Pasis la tempo. Mod kaj Pol ekhavis gefilojn... ekhavis nepojn... ekhavis pragenepojn... La hararoj de Mod kaj Pol blankiĝis, iliaj vangoj sulketiĝis, sed iliaj ridetoj ankoraŭ ŝajnis junaj kaj ĉarmaj, ĉar ili ankoraŭ ege amis unu la alian. Unu matenon, ili hazarde promenis man-en-mane tra densa kaj bela arbaro, kun neĝkovritaj larikoj brilantaj en la vintra suno. Ĉu tio vere okazis hazarde? Ĉu la animo de Pol senscie sopiris delonge pri ĝuste tiu loko? "Ĉu vi scias, Mod, - li diris al sia edzino - mi pensas, ke la amo estas la plej kara afero, por kiu indas vivi." Mod jesis ridetante, kaj ili kisis unu la alian. Ili daŭris iri brakume. Antaŭ ili, videblis sur la neĝo spuroj de sciuro. Ili sekvis la spurojn kelkan tempon. Jen la rapide grimpanta larikon, skuanta branĉon, faliganta konuson kaj ankoraŭ ion...

Kion? Kion la sciuro ĵus faligis? Pol mirege malkovris... sian delonge perditan fluton! Lia mano prenis ĝin kaj li ekludis ĝin. Mod ame brakumis lin, kaj iliaj koroj batis kune, unu apud la alia. Pol ludis, ludis, dum la neĝo ekfalas el la blanka ĉielo. Malantaŭ ili, malaperis iliaj spuroj sur la vojo. Ekvesperiĝis... eknoktiĝis... aŭ eble sentempigiĝis...


Bang! La murhorloĝoj batis la dek duan fojon, kaj la kastelo relumiĝis. Ĉio iĝis samkiel antaŭ minuto. Ĉio, krom la ĉeesto de nova pupo, kiu estis la ridetanta Mod. Junaj reigiĝis Mod kaj Pol, vestitaj per printempaj vestoj, samkiel ili estis portintaj tiam, en la parko. Sed kial iliaj hararoj restis blankaj? Ĉu degelantaj neĝflokaj ankorau kovris ilin?

En la horloĝmuzeo, apud la pordo, Mod kaj Pol bonvenigas kaj adiaŭas la vizitantojn. Pol flutas, dum Mod moviĝas laŭ la ritmo de lia muziko. Ne, ne, tio ne veras. Mod moviĝas kaj Pol flutas laŭ la ritmo de ŝia movado. Ne, ankaŭ tio ne veras. Bonvolu viziti la muzeon kaj klarigu vi mem pri tio.

Jen estas la vica serioza kaj amuza leciono de Johan'-Luko Tortel, verkita en la formo de libera babilado. Lernu por bone scii la Esperanto-gramatikon.

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Proverboj por komencantoj



Kia patrino, tia filino (862)

Ki-a, ti-a estas "tabel-vortoj" (tio estas la 45 il-vortoj, kiujn oni kun-igas en tabelon en la Esperanta gramatiko). **Kia** kaj **tia**, vortoj en -a, konservas la karakteron de adjektiv-eco de ĉiuj vortoj kun fino -a (tiun karakteron ni vidis lastan fojon). Ili demandas, aŭ indikas, pri la eco, la speco, la naturo de la vorto al kiu ili ligiĝas: kia tipo de patrino, tia tipo de filino. Ni rimarku, ke de-nove aperas la paro **kia-tia** kiun ni citis en la antaŭ-lasta babilado. Zamenhof preferis tion, ol **tia-tia** kiun li ankaŭ povus elekti, kiel faras aliaj "naciaj" lingvoj.

Tiu kvar-vort-a simpla proverbo sen-brue mal-fermas al ni tre interesan pordon. Ĝi klare indikas, ke filino similas patrinon. Same, en:

Kia reganto, tia servanto (864) kaj en:

Kia sufloro, tia aktoro (866)

ni sentas tujan ligan de simil-eco: **bona servanto se bona estro, malbona aktoro se malbona sufloro**, ktp. Kiam diro klare indikas sian sencon, ĝi estas denotacio, simpla informo. Male la proverbo:

Kia fripono, tia bastono (836)

ne estas rekte kompren-ebla; la diro kvazaŭ ne havas sencon; kia rilato inter la persono kaj la objekto? Nur post iom da pri-penso ni komprenas, ke bastono punos la friponon kaj do devas konveni al la fripon-eco: se granda, devas fali granda bat-ado; se eta, falu nur bat-ad-eto. Tiun sencon aludon, el-vok-ivan, ne rekte klar-ig-eblan, oni nomas konotacio.

Foje denotacio kaj konotacio povas eĉ kontraŭi sin reciproke:

Bela birdo ! (160)

oni aludas pri ridinda aŭ mal-ŝat-inda persono, kiun ni ironie laŭdas, sed fakte mokas. Tiu ironio kaŝita estas sarkasmo. Alia ekzemplo de sarkasma konotacio estas la respondo de la filino al sia patrino en la Zamenhofa rakonto "La Feino", en §19 de la Ekzercaro en Fundamento de Esperanto:

"Estus tre bele, ke mi iru al la fonto!"

Ŝi intencas kompren-igi: "mi rifuzas!"

Post tiu promenad-eto en lingvistiko, ni revenu al last-foje vidita proverbo:

Aŭ festo, aŭ fasto (132)

La ideo de fasto (manĝo-rifuzo) troviĝas en la lingvoj angla: **fast**; germana: **Fasten**; sveda: **fasten**. Ĝi de-venas el ĝermana malnova vorto **fastan**, kiu signifis: firme teni. Ni memoru: en la nunaj aviadiloj, anstataŭ la inter-naci-lingvan **ligu sidzonon** (sid-zonon), ni legas la naci-lingvan "**fasten seat belts**". Ja **fasti** signifas firme teni kontraŭ manĝ-emo, sed en kelkaj kazoj tio simple ne eblas! Oni nun vizit-adas pra-Egipton per ŝipa vojaĝo sur Nilo. Ĉe-borde vicoj da kaleŝoj atend-adas turistojn al monumentoj. Se la Ramadana periodo okazas somere, la kompatindaj koĉeroj nek manĝas nek trinkas de la kvara matene ĝis la naŭa vespere sub suno piramide varma. La ĉevaloj almenaŭ havas gren-sak-eton sub la mentono, dum rajtas la homoj je nenia manĝo. Sed akra-vida binoklo povas montri, ke de tempo al tempo iu aŭ alia kaŝe portas la manon de la poŝo al la buŝo. Ne timu, koĉero, Alaho ne mal-diskretas kiel fi-turisto!

Ni vizitas Egipton kun ge-amikoj per ŝipo: ni al-iras monumenton kun turistoj per kaleŝo. Iuj lingvoj konfuzas sian **kun** kaj **sian** per. Se ni havas tian denaskan lingvon, ni riskas tion mis-fari en Esperanto. Du proverboj helpu nin por bone senti la diferencon inter per kaj kun:

Oni vivas ne kun mono, sed kun persono (1838)

Oni batas per vipo, por ke sentu la ripo (1817)
(la ilo estu konvena al la celo).

Ni nun ĉesu, ni morgaŭ ankoraŭ babilos! ĉar ja:

Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno (2049)

Ĝis venonta fojo! Johan' Luko

Kontraŭ doloro helpas bona humoro

L.L. Zamenhof

Ŝercaj ilustraĵoj al konataj zamenhofaj proverboj

Arina Osipova
[Jekaterinburg, Rusio]



Vivi kiel kuko
en butero

Komencanta esperantistino kaj nia samurbanino Arina Osipova montris al ni kiel amuze eblas ilustrati apartajn zamenhofajn proverbojn per diversaj ŝercaj bildetoj. Tial vi povas memorfiksi la proverbojn, dum vi serĉas aŭ desegnas bildetojn al ili.

Ĉe la redakcio aperis ideo proponi ankaŭ al aliaj legantoj de "K" provi elekti unu aŭ kelkajn plaĉajn zamenhofajn proverbojn kaj serĉi taŭgajn ŝercajn bildetojn al ili. La proverboj troviĝas en la Proverbaro, kaj bildetoj - ĉie, kie vi trovos ilin - en revuoj, en libroj, en bildstrioj, certe vi povas mem pentri ilin, se vi kapablas. Do, ni atendas viajn kontribuadojn!

la red.



Li estas portreto de
sia patro



Ĉio havas sian finon



Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon



Pendonto ne dronos

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Jen al via atento estas neelpensita humura historio, kiu okazis al Tereza Kapista dum E-seminario en Afriko kaj iĝis fragmento de ŝia libro "Esperanto Lingvo de Paco".

La netrinkita biero

Tereza Kapista

... La tago estis laciga kun komplikaj kaj kiam dum vespero Hussumani (nomo de afrika studento *la red.*) akompanis min al la hejmo, mi ekhavis ideon trinki bieron. Mi ne deziris ie ajn eksidi, nur mi petis lin, ke li iru al vendejo kaj aĉetu al mi unu bieron. Tio kostas 1 eŭron kaj la akvo – 2, sed mi ne povas instrui trinkante bieron. Nun mi decidis fari tion antaŭ enlitigo. Kiam li foriris, mi manĝis kaj nature post la manĝo mi deziris trinki la bieron. Sed kio okazis?

Mi denove ne trovis tiun malfermilon, kiun mi devas havi. Mi hontis iri kaj peti de la "fratinoj" (ĉe kiuj ŝi loĝis – la red.) la malfermilon, ili povis pensi: kia drinkemulo loĝas ĉe ni? Kiam foje al mia domo venis majstroj kalki la murojn, mi vidis, ke la majstro tiamaniere malfermas la botelojn, ke li enmetas la botelon en klinangan truon. Ho, mi ekĝojis, ke mi rememoris pri bonega ideo, sed kiam mi malfermis la pordon mi ekvidis anstataŭ tiu langeto nur globeton kaj ne ekzistis aperturo en la alia parto de la pordo. Do, tio ne funkcias.

Poste mi provis per diversaj iloj, tondilo ktp., sed tio ne iris. Mi havis ideon malfermi ĉe la rando de la fera lito, kiu eble helpas malfermi la kovrilon de la botelo. Mi eksidis kaj tiris: tiris, kiel en rakonto la avo la beton; mi tiris, sed tio ne iris. Mi provis kelfoje, la lito estis jam meze de la ĉambro, en iu momento, kiam mi tute ne esperis, la botelo malfermiĝis kaj la enhavo ege ŝaŭmante forfluis sub la liton kaj mi kuŝis en ŝaŭmo. En la botelo eble restis nur 5 cm da biero. Ne sciante kion fari, mi per mia viŝtuko viŝis la plankon ĉar tiam jam la tuta ĉambro estis plena. Tiu forverŝita biero malbonodoris, mia vestaĵo ensuĉis la ŝaŭmon, mi devis tuj malvesti min. La banejo estis en koridoro. Tio estis vera sceno por filmo, kies titolo povus esti: "La netrinkita biero". Do, mi devis lavi per pura akvo la plankon, per sapo mian viŝtukon, fine duŝi min, ĉar mi odoris kiel malbonkvalita drinkejo.



Aleksej Šulepin [Osa, Rusio]

La Nova

Arkadij Inin
Esperantigis el la rusa
Raja Kudrjavceva
[Jekaterinburg, Rusio]

La viva rotacio aŭ dialektiko

Nova jaro!

Novaj revoj!

Novaj esperoj!

Nova amiko!

Nova domo!

Nova amo!

Nova kanto!

Kanto...

Amo...

Domo...

Amiko...

Esperoj...

Revoj...

Malnovaj revoj.

Malnovaj esperoj.

Malnova amiko.

Malnova domo.

Malnova amo.

Malnova kanto.

Malnova jaro.

Nova jaro!

jaro en nia kalendaro

Anekdotoj el la Novjara kolekto de la redakcio

Interparolas du neĝeroj:

— Vi kien flugas?

— En Grenlandon. Mi decidis fari por mi feriojn. Kaj vi?

— En Afrikon. Mi decidis fari por ili panikon.

*

Malgranda knabo al la patro:

— Paĉjo, mi plu neniam iros kun vi veturi per sledo.

— Sufiĉas plendi, pli bone tiru!

*

Estas 31-a de decembro. Telefonas infano:

— Hola! Ĉu tio estas ambulancejo? Venu rapide al ni, mia patro frenezigiĝis. Li vestis ruĝan pelton, vintrajn botojn kaj al ĉiuj diras, ke li estas Avo-Frostoj.

*

— Avo Frostoj, donacu al mi al la Nova Jaro pupon "Barby"! – krias malgranda knabino.

— Ne krii tiel laŭte. Avo Frostoj ekaŭdos, eĉ se vi diros mallaŭte, - trankviligas ŝin la patrino.

— Jes, sed la paĉjo fermiĝis en sia ĉambro kaj povus ne ekaŭdi!

*

— Jen al vi donaco por la Nova jaro, - diras patro al la filo, enmanigante al tiu gitaron.

— Dankon! Sed pardonu, kial la gitaro estas sen kordoj?

— Ne rapidu, kara mia. Vi dekomence lernu ludi ĝin, kaj poste ni aĉetos al vi la kordojn!

*

Anonco.

"Ĉu vi volas mendi Avo Frostojn hejmen por la Nova jaro? Telefonu al nia servo kaj ni forŝaltos hejtadon de via loĝejo!"

Se vi volas, ke viaj infanoj festu Novjarfeston hejme – foriru mem festi ĝin ĉe viaj amikoj.

*

Du nekonatoj interkonsentas telefone pri renkontiĝo la 1-an de januaro.

— Mi proponas renkontiĝi ĉe la metrostacio vespere la 1-an de januaro. Kiel vi aspektos?

— Malbone...

*

Novjara festeno. Unu el la virinoj diras al la alia.

— Al mi ŝajnas, ke ni jam festis kune Novan jaron en iu kompanio antaŭ 12 jaroj.

— Ĉu vere? Iel mi ne memoras...

— Ankaŭ mi malbone memoras vizaĝojn. Sed robojn mi memoras tre bone.

*

La gastoj tro longe sidas ĉe la Novjara festotablo, la mastrino jam ne scias, kion fari. Subite sonoras telefono. Ŝi iras al la telefono, prenas aŭskultilon kaj subite al ŝi venas ideo. Ŝi revenas al la gastoj kaj krias

— Terure, okazis incendio!!!

La gastoj ĉiuj kune:—

— Ĉe kiu?

— Mi pretaraŭskultis. Ĉe iu el vi.

*

Telefonvoko al polico la 1-an de januaro:

— El mia aŭto oni forŝtelis stirilon kaj ĉiun aparataron!!!

— Atendu, ni tuj venos al vi.

Post 3 minutoj denove telefonvoko al polico:

— Estas denove mi. Okazis nenio.

Simple mi eksidis sur la malantaŭan seĝon.



Denis Komarov [Ustj-Katav, Rusio]

Edzo longe disputas kun sia edzino kaj fine, ege laca, diras:

— Bone, okaze de la Novjarfestoj mi cedas, estu laŭ vi...

— Estas jam malfrue. Mi jam pensas tute alie!

*

Mateno de la 1-a de januaro. Sur tablo kuŝas papereto, sur kiu estas skribita:

" Mi gratulas vin okaze de la Nova Jaro!"

P.S. Peplakvo en fridujo.

P.P.S. La fridujo staras en la kuirejo.

*

La plej kurta tago estas la 1-a de januaro. Oni vekigis – kaj post la fenestro jam mallumas.

*

Juneco estas tempo, kiam vi jam ne kredas, ke por Nova Jaro al vi venos Avo Frostoj, sed ankoraŭ esperas, ke al vi venos la Neĝulino. (*)

(*) En Rusio Avo Frostoj venas ne sola, sed nepre kun sia juna nepino – Neĝulino.

Nuna heroo de la rubriko estas Ksenija Prilepskaja, 25-jara ĵurnalistino el Moskvo, origine devena de la insulo Sahalin ĉe la Fora Oriento de Rusio. Ŝi esperantistiĝis en 2002 en Moskvo, dum ŝia tatempa laboro en "Greenpeace-Russia".

Ksenija Prilepskaja
[Moskvo, Rusio-Brazilo]

Bona Espero

La ideo pri la vojaĝo al "Bona Espero" en Brazilon venis al mi en la jaro 2003, kiam mi eksciis pri la ekzisto de "Bona Espero" (pri ĝi al mi rakontis fama krimea Esperanto-aktivulo Jefim Zajdman (*) el Jalto. Mi tuj komprenis, ke ligi Esperanton, infan-edukadon kaj naturajn metodojn de mastrumado estas brilega ideo, kaj ekvolis nepre viziti "Bonan Esperon".

"Bona Espero" estas "fazenda-eskola" (bieno-lernejo de mil hektaroj) por infanoj, kiuj troviĝas en malfacila socia situacio (ekz., kies patro estas en malliberejo, ĉar li perfortis la filinon, aŭ el familio de alkoholuloj, aŭ infanoj forlasitaj pro divorco de la gepatroj, ktp.). La infanojn rekomendas la Publika Justico kaj la juĝistoj, sed la direktoroj de BE pritraktas ĉiun kandidaton aparte kaj poste faras la konkludon – ĉu preni aŭ ne.

Multan atenton ĉi tie oni dediĉas al ekologiaj, natur-amikemaj metodoj de vivado kaj mastrumado. Do, la telefono, ekzemple, estas senkabla (ĉar telefon-kablojn ĉi tien oni ankoraŭ ne kondukis), do, ĝi estas radiotelefono kaj funkcias per sunpaneloj (sunbaterioj). La elektra energio aperis ĉi tie nur en 1998.

do, oni uzis antaŭe parte sunpanelojn, kandelojn por lumigi kaj multe da laboro oni faris mane, kiel ekzemple lavado de centoj da tukoj. Nun en la ĉefa kuirejo estas jam lavmaŝino por manĝilaro – vere nekredbla luksaĵo, kiun kelkaj jaroj antaŭe la loĝantoj de "Bona Espero" eĉ ne povis imagi. Temas pri financa subteno de nederlandaj esperantistoj.

Ĉi-tie oni celas produkti memstare tiom multe da produktoj, kiom eblas, kaj aĉetas nur tion, kion oni vere bezonas, kiel sapon, oleon, farunon, sukron, benzinon, higienajojn.

La infanoj havas lecionojn ekde la 9a ĝis la 5a posttagmeze kaj intertempe havas paŭzojn, dum kiuj ili ludas kaj manĝas. Antaŭ kaj post lecionoj mi zorgas pri la infanoj (ekz., ke ili estu taŭge vestitaj, ordigu siajn ĉambrojn, faru hejman taskon), ludas kun ili, babilas kaj instruas Esperanton.



Tuj mi devas aldoni, ke mi okupiĝas nur pri la knabinoj, la knabojn prizorgas 19-jara volontulo Vasiliĝ Penny el Germanio.

Krom prizorgo de la knabinoj mi ankaŭ helpas pri mastrumado – bakas panon, foj-foje kuiras, helpas kolekti specifajn lokajn fruktojn "ĵabutikabo", el kiuj mi kaj sinjorino Ursula poste faras marmeladon por ĉiuj loĝantoj de BE.

La naturo de ĉi tiu regiono estas tre bela – la teritorio de BE de tri flankoj ĉirkaŭas nacia parko, kaj la nomo de la regiono mem – Alto Paraiso – ĉiuj esperantistoj tuj kaj senerare kapablas traduki, ĉu ne? Jes, ĝi vere signifas "Alta Paradizo"! Kaj efektive, ĝi estas paradizo!

"Bona Espero" estis fondita en la jaro 1957 laŭ iniciato de 6 brazilaj esperantistoj el la urbo Recife / Pernambuco.

Geedza paro, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia venis ĉi tien kiel banalaj turistoj en 1973 kaj estis magie kaptitaj de la

ideo kunigi Esperanton, vivon en belega naturo kaj socian laboron kun infanoj.

Ili ambaŭ jam senhalte volontulas ĉi tie dum 33 jaroj, kaj dum tiu tempo edukis pli ol 400 infanojn.

Dum tiu tempo "Bona Espero" iĝis ne nur oficiale akceptata de la ŝtataj instancoj kiel protektejo kaj edukejo, sed ĝi ankaŭ multe aktivigas por prospero de la tuta regiono, speciale en la socia kampo. Oni sukcesis per la helpo de kunlaboro de esperantistoj-rotarianoj donaci al la loka hospitalo rentgen-aparaton, buson por transporto de la lernantoj, hejmon por beboj, hejmon por maljunuloj, materialojn por lernejoj de la regiono ktp., ĉar estraranoj de "Bona Espero" estas membroj de la loka Rotaria klubo, kiuj realigas multajn sociajn plibonigojn.

Mia vojaĝo al Brazilo iĝis ebla dank'al subteno de la FAME-fonduso el Germanio kaj la Noll-fonduso el Danio, kaj ankaŭ dank'al kelkaj privataj personoj. La celo de mia vizito – studi la eduk- kaj mastrumadmetodojn, helpi per instruado de Esperanto kaj per fizika laboro kaj tiumaniere kolekti materialon por aperigi kelkajn artikolojn en diversaj revuoj, cele informi la Esperanto-komunumon (kaj ankaŭ eksteran publikon) pri tiaspeca aktivado de esperantistoj kaj vekti intereson al la kunlaboro kun "Bona Espero".

Kaj mi ŝatus atentigi ĉiujn, ke:

A) ĉi tie, en "Bona Espero", ĉiam mankas helpemaj kaj laboremaj volontuloj – do, bonvenon!

B) ankaŭ mankas sendependaj (finance kaj alirilite) homoj, prefere paro, kiuj pretas veni ĉi tien por daŭre loĝi kaj labori por daŭrigi la agrikulturan kaj socialistan mision de "Bona Espero" – kaj, efektive, post la tempo anstataŭigi gesinjorojn Grattapaglia, kiuj volontulas ĉi tie jam dum 33 jaroj.


C) Ĝenerale ĉiuj esperantistoj ĉiam estas bonvenaj ĉi tie. Kiel diras sinjorino Ursula, "nia fazenda-eskola estas fakte proprajo de la tutmonda Esperanto-komunumo" – do, profitu la okazon!

(*) pri Jefim Zajdman vi povas legi en №4 de "Komencanto-2006"

Konkurso "Enigmoj-2006"


Kompilis Johana Schertzer-Hervy [La Meauffe, Francio]

Ĉirkaŭ domvortoj = 20 poentoj



Vertikale 3/ El ĝi eliras fumo. 3/ Nokte ĝi estas fermita. 5/ El ĝi elfluas akvopluvo. 7/ Subtegmenta ĉambro. 9/ Enirŝtupoj. 9/ Inter teretaĝo kaj fundamento. 11/ Ĝi estas la bildo (mia). 13/ Tegolaro. 14/ Unua loĝnivele. 15/ Okulo de domo. 16/ Ŝtupo de pordo. 17/ Sinonimo de la tria solvo.

Horizontale C/ Kiel la 11-a vertikale, sed malpli ameme aŭ afable. C/ Same pli simple. D/ Surtera sido de domo. E/ Subtera ĉambro. G/ Ŝtonflanko de domo. H/ Pinta fasado. H/ Romeo kantas sube. H/ Muziknoto. Ĥ/ Elemento de tegmento. I/ Antaŭo de domo Ĵ/ Tutloĝejo sub tegolaro. L/ En- aŭ eliro kaj en- aŭ eliraĵo. L/ Loĝnivele ne tere.



Rezultoj de la konkurso el la 4-5-aj numeroj

Jen estas nomoj kaj gajnitaj poentoj de la konkurso el "K" 4,5-2006

- 1) **Anton Loŝmanov** [Rusio]
⇒ 15 + 10 = 25 poentoj
- 2) **Christian Riviere**, [Francio]
⇒ 15 + 10 = 25 poentoj
- 3) **Jackie Huberdeau** [Francio]
en tiu ĉi parto ne partoprenis

Korektaj respondoj

Komencanto 4-2006

Desupre dekstren:

1. Stano 2. Imamo 3. Anaso 4. Upaso 5. Prago 6. Blato 7. Orango 9. Orbito 11. Ibis 12. Odino 13. Kairo 14. Trito 15. Amiko 16. Acido

De supre maldekstren:

2. Italio 3. Atako 4. Uralo 5. Piano 6. Boato 7. Omaro 8. Ovalo 10. Orcino 11. Iriso 12. Olivo 13. Krizo 14. Tribo 15. Animo 16. Afiso

Komencanto 5-2006

t	p	o	m	o	u	r	b	o	o
e	r	a	k	v	k	f	r	a	g
o	r	i	p	o	u	o	o	ĝ	n
n	u	i	o	m	k	m	o	r	a
s	k	o	k	u	k	u	k	p	i
o	t	n	o	t	o	r	a	o	z
o	o	a	n	o	f	r	a	m	b
m	m	m	d	a	n	o	n	a	o
o	a	t	o	r	i	b	a	n	o
p	r	a	p	o	p	r	u	n	o

Do, la ĝeneralaj rezultoj de la "Konkurso-2006" estas:

- 1/ **Anton Loŝmanov** [Rusio]
⇒ 40 + 25 = 65 poentoj
- 2/ **Christian Riviere**, [Francio]
⇒ 22 + 25 = 47 poentoj
- 3/ **Jackie Huberdeau** [Francio]
= 10 poentoj

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mia amiko ne povas promeni. Li ŝatas ludi ŝakon kun iu koresponde. Skribu al mia nomo kaj adreso:

s-ino Anna Maria Danell
Tibbleby
S - 740 20 Vänge
Svedio
annamariadanell@yahoo.ca

Mi deziras korespondi pri artman-faraĵoj. Se vi skribos, mi garantias respondon! Mi preferas korespondi per ordinara poŝto.

Maria Nascimento
Estrada Urucânia n° 4170,
Santa Cruz,
Rio de Janeiro, 23570-295,
Brazilo

Mi estas 50 jara komecanto. Mi serĉas ret-poŝtajn korespondantojn.

LEE Moo-eun
Seulo
Koreio
greatbull_7@hotmail.com

Mi estas 46 jara virino, mez-nivela esperantisto. Int: kulturo, lingvoj, vojaĝoj, literaturo, arto, moroj kaj kutimoj, kuirarto, jogo. Mi serĉas samgeneraciajn korespondantojn.

s-ino Etsuko NAKAZAWA
Kioto,
Japanio
ecuko@mui.biglobe.ne.jp

Serĉu
korespondamikojn ĉe
www.Edukado.net

Volas korespondi gestudentoj de la Universitato de Ekonomia Administrado el u. Hubei

Grace, fraŭlino, 20-jara
wea_hb_cn@hotmail.com
Rhode, fraŭlino, 20 jara
yanhui0103@yahoo.com.cn
Viktoria, fraŭlino, 20 jara
wea_hb_cn@hotmail.com
Veia, fraŭlino, 20 jara
jiangshan0401@yahoo.com.cn
Riĉardo, fraŭlo, 20 jara
wea_hb_cn@hotmail.com

Ĉinio

Mi estas 17-jara lernantino. Mi volas korespondi tutmonde. Int.: vojaĝi.

s-ino Adrienn Boncz
Zalaegerszeg
Hungarujo
manooo@freemail.hu

Mi estas Erika el Litovio. Mi havas 17 jarojn. Int: muziko, arto. Mi volas korespondi kun geesperantistoj el la tuta mondo. Mi respondos al ĉiuj.

Erika Paltanaviciute
Marijampole
Litovio
bamboooocha@one.lt

Mi estas 18 jara fraŭlino, studentino, komecanto. Int: muziko, lingvoj, poezio, vojaĝado.

Oksana PALIVODA
str. 70 riĉja Jovtnja 14
Lebedivka
Viŝgorodskij r-n
Kijivska obl, 07360

Ukrainio
palox@mail.ru

Mi estas 19-a jara junulino. Mi studas por esti ĵurnalisto. Mi ŝatas esti en centro de eventoj kaj ŝatas aktivan agadon. Sed de tempo al tempo mi volas silenton kaj solecon por pensadi kaj revii. Miaj ŝatokupoj estas teatro, muziko (klasika kaj rok), ĉevalridado, legado de libroj. Mi ŝatas promenadon en la naturo, ŝatas maron, pluvon kaj promeni sur stratoj aŭtune. Mi volas vojaĝi. Mi satus korespondi kun geamikoj el la tuta mondo. Mi preferas paper-poŝton. Tio estas iom romantike, ĉu ne? Mi loĝas en Siberio, ĉe belega lago Bajkal. kiu estas plej profunda lago sur la Tero Pri Bajkal oni diras, ke ĝi estas fenestro en la kosmon.

s-ino Julia Solovjova
str. Medicinskaja, 14
Ulan-Ude
670047

Rusio
s_g@inbox.ru

Mi estas 19 jara studentino. Mi volas korespondi kun interesaj gejunuloj el diversaj landoj. Mi studas por esti ĵurnalisto. Mi ŝatas foti, aparte naturon kaj belajn domojn. Mi ŝatas promenadi en nokta urbo Mi estos feliĉa ricevi leteron kun foto.

s-ino Nastja Levitina
str. Rinĉino, 26-28,
Ulan-Ude
RU-620029

Rusio
levitina9@mail.ru

Mi estas 41 jara viro, E-komecanto. Mia profesio estas flegisto por malsanaj maljunuloj. Min interesas kulturo kaj psikologio. Mi volas korespondi kun esperantistoj el diversaj landoj. Ne gravas aĝo nek sekso. Mi preferas korespondi paper-poŝte.

s-ro Takase Hidehisa
1354-15 Oume-shi
Takinoue-cyo
Tokyo, 198-0085
Japan
hidehisa86@hotmail.com

Mi estas 26 jara viro, agronomia inĝeniero. Mi deziras korespondi paper-poŝte kaj ret-poŝte.

Guillermo Bes Salazar
Calle 2 # 74 1/2 entre
Gasómetro y 9.
Mariana de la Torre. C.P:
90200.
Santiago de Cuba,
Kubo
guillermo@cies.ciges.inf.cu

Grupo de junaj gelemantoj, proksime de San Diego, en la plej sudokcidenta angulo de Usono. Vi povas skribi al iu el ni retroŝte aŭ paperpoŝte.

Infan-klubo
"La Verda Stelo"
PO Box 711823, Santee,
California 92072-1823
Usono
Garymar2000@aol.com

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

